Manfred Hausmann,

Post la pluvo

tradukita de Manfred Retzlaff

Printempe ĉiam venas pluvo varma,
alvenas, restas kaj foriras ĝi.
Ekfloras la pejzaĝo ĉarma.

Ĉifoje dum la nokto tiu ĉi
velurflugile kaŝe albloviĝis,
malsekigante tiun etan bedon pli.

Hieraŭ je l' vespera hor' pendiĝis
profunde la nubaro super mi
kaj veterlumo ĉie eklumiĝis.

Sed nun sin liberigas tiu ĉi
arbedo de ligiloj noktaj siaj,
malrekte staras la floraro, ĝi

sin klinas sub girlando-ŝarĝoj ĝiaj
kaj fontas peza, dolĉa flor-odor'
el jenaj ĝardenegoj imperiaj,

kaj eksopiras ĉies homo kor'.

Traduko de la Germana poemo "Nach dem Regen" de MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2014.*

Arg-1090-2198 (2014-10-27 14:34:17)